

LA PLEJ FRUAJ

SFNAFIKSAJ KUNMETAJOJ EN ESPERANTO

(D.B.GREGOR, NORTHAMPTON, ANGLUJO)

La estiĝo de Esperanto okazis iasence kiel la ekesto de la Kosmo: per la Granda Eksplozo de la Unua Libro en Julio 1887; kaj, same kiel tiu, la Unua Libro enhavis en si la semojn de plua disvolviĝo, t.e. la diversajn erojn, kiuj, kiel atomoj kaj molekuloj, altiras aŭ forpuŝas sin reciproke kaj povas unuiĝi en nekalkuleble multaj kombinaĵoj. Se do oni volas observi la disvolviĝon de Eo, tio, kio plej klare montras ĝin, estas ĝuste ĉi tiu procezo; alivorte, la materio, sur kiun devas koncentriĝi la analizo, estas tiuj vortoj, kiuj konsistas el kunigitaj eroj, t.e. la kunmetaĵoj.

Kvankam ankaŭ la vortoj formitaj pere de afiksoj estas verdire kunmetaĵoj, tamen ni ne prenos ilin en konsideron ĉi tie, ĉar tiaj vortoj ekzistis potencie jam de la unua momento; alivorte, ili estas parto de la Granda Eksplozo prefere ol de la posta disvolviĝo.

Tia studo, kia la nuna, permesas samtempe (1) vidi, kiuj lingvoj servis por indiki al la fruaj verkistoj la elektendajn erojn; (2) kompari la rezultantajn procentojn kun tiuj de la lingvoj liverintaj la radikojn, kiel montrite en La Fontoj de Esperanto; (3) eltrovi la verkistojn, al kiuj ĉiu kunmetaĵo ŝuldiĝas kaj tiamaniere pritaksi ilian kontribuon al la lingvo; (4) atentigi pri vortoj ŝajne mortnaskitaj, sed eble revivigeblaj; (5) dati la eniron de vortoj en la lingvon por eventuala historia vortaro; kaj (6) fiksi la ordon, en kiu la esperantlingvaj skribaĵoj aperis (tasko pli malfacila ol oni pensus).

Apartan, kaj malpli gravan, lokon inter la kunmetaĵoj havas tiuj, kies unua elemento estas prepozicio. Kiam temas pri vorto kun simpla, laŭlitera (ne metafora) signifo, ili estas menciataj plejparte nur por kompleteco kaj laŭ la plej konciza maniero, ĉar la deveno de la vorto aŭ estas memevidenta aŭ ne povas esti certigita (ekz. latina dis- egalas R PA3-, P roz-, G zer-), kio ja povas okazi ankaŭ ĉe la aliaj kunmetaĵoj.

La vortoj estas grupigitaj en alfabeto ordo laŭ sia datita dokumento, kun lingva deveno flanke kaj rimarkigoj sube.

1. LA UNUA LIBRO (Julio 1887)^{1/}:

- (a) Patro nia: ĉiutaga RP^{2/} (ежедневный, со/dzienny).
- (b) El la Biblio: senforma RP (без/видна, bez/kstaltna)
- (c) Letero: aldoni P (dodać); almetas RP (приставлять, przystawiać);
subskribo RPG (подпис, podpis, Unterschrift)
- (d) Mia Penso: senmovesĉ Eo' (ĉar RP uzas ne-)
- (e) Promeso: internacia RP (международный, miedzynarodny)
- (f) Gramatiko: vaporŝipo G (Dampfschiff).

STATISTIKO: 8 vortoj, el kiuj 6 pere de prepozicioj (po 2 sen, al; po 1 sub, inter), 1 pere de pronomo (ĉiu), kaj nur 1 el du substantivoj, elektita ĝuste por illustri kunmetaĵojn. LINGVA FONTO: slava, kun G unufoje aŭ sola aŭ kuna.

RIMARKIGOJ: (I) sen- indikas slavan (aŭ malofte Esperantan) vorton, ĉar AFG ne uzas siajn ekvivalentojn kiel prefikson. (Pri la logikeco de sen- vidu Rim. sub n-ro 3). (II) la slava prefikso por ĉiu ne estas la kutima vorto por tiu pronomo. (III) internacia estis jam en R (интернациональный, el F). (IV) Al prefiksita al- respondas RP при, przy aŭ до, do, G zu. Tial estas verŝajne, ke foje subentras latina ad (ekz. aldoni egalas latinan adde-re; kaj almeti povas reiri al G zusetzen). (V) Ĉe vaporŝipo ni vidas RP, pro netaŭga dua elemento, nete flankenlasitajn favore al G.

1/ Oni atentu, ke la Antaŭparolo aperis en Eo nur 16 jarojn poste (kp. OV p. 17).

2/ Ni metas R antaŭ P supozante, sur la bazo de Letero de Zamenhof al Michaux de 21. 2. 05. (LZ pp.110-111), ke vorto venis en la kapon al li en sia rusa antaŭ ol en sia pola formo.

2. LETEROJ AL MAJNOV (OV 475) (okt. 1887):

priparolata Eo.

REMARKIGO: G besprechen montras, kiamaniere Esperanta pri - povis havigi al si transitivigan forton (ekz. verŝi akvon/priverŝi florojn; v. Rim. sub n-ro 3 (c) kaj Fontoj, p. 8).

3. DUA LIBRO (Jan. 1888):

(a) Antaŭparolo (OV 21-29):

afertuŝante Eo (sed kp.G Sachbemerkung)	neatendema Eo
alinaciaj R	nekomprenebla RPG
alpreni G (annehmen)	nenatureco RPG
altiri G	nepardoneble RG
antaŭiri RG	plibonigo RG
alsendi G	pripensado Eo
antaŭparolo RG	senĉese RP
antaŭsciigi R	sendependa Eo
bonsona RG	senerara Eo
ĉiuflanke Eo	senfina RP
ĉiuhoma Eo	senkondiĉe R
ĉiujare R (ежегодный)	senkrede Eo
eldono RPG	senmerita Eo
eliri RPG	sennecesa Eo
ellasi RG	sensenca RP
ellerni RP	sensignifa Eo
enkonduko RPG	senutileco RP
fordoni Eo	tutmonda R
foriri G	unuatempa Eo
interparolo Eo (kp.G Unterhalten, F entretien)	voĉdono Eo (kp.R
kunligi RP	подача голоса)
kunsento RG	

STATISTIKO: El la 43 vortoj, 27 formiĝas per prep., kun sen plej ofta (11), sekvita de el (4), al (3), antaŭ (3), kun (2), kaj en, inter, pri, tra po 1. Ankoraŭ 3 kun ĉiu. Komenciĝas la serio de ne- (v. sube Rim.1), kaj de aliaj prefiksitaj adverboj (for, pli). Denove nur unu du-substantiva (voĉdono); sed nun ankaŭ 1 subst/verb (afertuŝante) kaj 4 adj/subst

(alinacia, bonsona, tutmonda, unuatempa). LINGVA FONTO: Ankaŭ plej parte slava (R kun aŭ sen P 12), sed la kontribuo de G pliiĝas (4 sola, 12 kun R kaj RP). Interese, ke 15 ne havas precizan modelon ekster Eo. RIMARKIGOJ: (I) el jam alprenis la signifon "plene", "ĝisfunde" (ekz. eller-ni). (II) Kvankam for devenas de G fort, la germana prefikso ĉe tiaj verboj estas ofte weg; do foriri povus esti ankaŭ Eo. (III) Se la Rim. sub n-ro 2 trafas, tiam malantaŭ pripensado povas stari G bedenken. (IV) Malgraŭ tio, ke sen logike sin kunligas kun subst., (ekz. senkondiĉe = senkondiĉoj), tamen la radiko plej ofte uzata kun ĝi estas verba: senkrede, -dependa, -erara, -signifa, -ĉese, -merita, -fina. Ĝuste pro tio la ekvivalentaj vortoj de RP (krom ĉe senĉese kaj senfina) komenciĝas per ne- anstataŭ bez-. Kiel jam vidite en Rim. I sub n-ro 1, la aldono de sufikso -ec- restarigas la logikon (ekz. senutileco). Valoras la penon dedukti de tio ĉi ion pri la sinteno de Z. al la gramatika karaktero de la radikoj. Estas klare, ke por li la karaktero de la radikoj donitaj en la Vortareto je la fino de la Unua Libro (kies 900 vortoj pasis sep jarojn poste en la U.V.) ne havis ligajn sekvojn por la vortfarado; kaj tio estis bona afero por Esperanto, ĉar alimaniere oni ne povus unuigi radikojn ne sciante la karakteron de la radiko, kio konsistigus grandan (kaj eĉ al naturaj lingvoj mankantan) malfacilaĵon. Sed de ĉio ĉi sekvas plua dedukto, t.e., ke ekzemple la radiko merit liveras meriti kaj merito egale rekte, tiel ke ne devus veni en la kapon cerbumi, ĉu merito ne signifas vere la agon meriti prefere ol la kvaliton akiritan per meritplena agado; same ĉe kred: kredo tuj signifas ne nur la fakton, ke oni kredas, sed ankaŭ tion, kion oni kredas; kaj same ĉe la ceteraj.

Ĉi tie tamen ni enkuras en embarason. Kial do poste en la U.V. Zam. opiniis necesa aldoni al kvin el la verbaj radikoj de la Unua Libro (gut, kaŭz, kost, pren, sem) la koncernan substantivan formon? Sendube, ĉar en la dumaj kvin jaroj evidentiĝis la neceso klarigi, ke substantivigita verba radiko povas signifi ion alian kaj plian ol la simplan agon. Sed pri tio Z. konsciis jam de la komenco, ĉar en la vortaro de la Unua Libro troviĝis unu tia verba radiko kun aldonita substantivo: vesti, vesto!

Alia unikaĵo de ĉi tiu vortareto estas tio, ke unu el ties radikoj ŝanĝis sian gramatikan karakteron ĉe alpreno en la U.V.: floro fariĝis flori, kun

floro aldonita sube kiel ĉe la supre prezentitaj vortoj (v. n-ron 13, Rim.IV).
 Ne estas klare, kial Z. bontrovis inversigi la vortoordon kaj, kontraŭ la natura
 procezo de lingva evoluo, subordigi la konkretan al la abstrakta signifo, tiom
 pli, ke de floro tute nature kaj rekte venas flori por indiki la esencan ma-
 nifestiĝon de floro.

Alia indiko, ke poste en U.V. Zam. iom baraktis kun ĉi tiu problemo, es-
 tas la ŝanĝo en la germana traduko de sufiĉ: en 1887 tiu estis ausreichend
 kaj genügend, do laŭforme adjektiva eĉ se uzebla adverbe; sed en 1893 tiu
 ŝanĝis nete adverba, genug, tiamaniere konformiĝante al R kaj P (kontraŭ A
 kaj F).

(b) Peco 1-16 (Ekzercaro):

alkudri G (zu-, annähen) (kp.RP пришить, przyszyc)	okulvitroj G (Augenglas "monoklo")
alporti F (apporter) (kp.RP приносить, przynosić)	plentago Eo
belskribado G (Schönschreibekunst)	pomarbo GA
bonsoneco RG (благозвучие, Wohlklang)	popoldiroj Eo (kp.G Volks- - ausdrücke)
bongusta Eo	popolrakontoj G (Volksmär- chen)
ĉiukonata R (всеизвестный)	pordokurtenoj Eo
defali RP (спасть, spaść)	postsignoj G (Nachspüren)
doktoredzino Eo (kp.R докторша, G Doktorin)	senespere RP (безнадежный, beznadziejny)
dormoĉambro G (Schlafzimmer)	senharaĵo Eo
duhora Eo	senvestigi Eo
elpelito RP (изгнанный, wygnaniec)	skribtablo G (Schreibtisch; kp.R письменный стол)
eltrinki G (austrinken; v. n-ron 3, Rim.I)	ŝvitbanejo G (Schwitzbad)
enverŝi Eo (kp.G einsthenken)	tagmanĝo Eo (kp.G Mittag- essen)
evortoj Eo	tagmezo G (Mittag)
farvorto Eo (kp.G Zeitwort)	tirkesto Eo (kp.F tiroir, A drawer)
flavruĝa Eo	transiri RPG
forĵeti Eo (kp.G wegwerfen; v. n-ron 3, Rim.II)	transporti RP (sed ankaŭ G transportieren)
gastama Eo (kp.G gastfreundlich, R гостеприимный)	travidebla RPG (прозрачный, przezroczysty)
jelabori Eo	ununombro G (Einzahl)
kudristinedzo Eo	unutaga RP (kp.G Eintags-)
kunlandano Eo (kp.R соотечественный)	vanĝaroj Eo (kp.G Backenbart)
kunmetita RP	vespermanĝo G (Abendessen)
litkovriloj G (Bettdecke)	vizaĝkovrilo Eo
matenmanĝi Eo (kp.R завтракать)	
nelegeble RPG (нечетный, nieczytelny, unlesbar)	
nemortema Eo	
nepropra (duon-) (filo) Eo	

STATISTIKO: 50 vortoj, el kiuj 17 kun prep. (sen 3; al, el, kun, trans po 2; de, en, je, post, tra po 1; 3 ne- kaj 1 for- kaj ĉiu- (mortnaskita; la dana havas nur "en historie"). Kvarfoje adj. kiel unua elemento. Nova grupo: numeralo kaj subst. (3). Du-substantivaj vortoj notinde kreskis (19). Parencaj al tiuj: 1 subst/adj (gastama), 1 subst/verb (matenmanĝas), 1 adj/adj (flavruĝa).

LINGVA FONTO: G (kun 1 A) gajnis kun 14 kontraŭ la slavaj 9, dividante kun ili pliajn 2. Jen la unua F (apporter). Kreskis la originalaj (Eo) per 25.

RIMARKIGOJ: (I) jelabori: poste anstataŭigita per prilabori (v. N-ron 12 kaj kp. G bearbeiten kaj N-ron 2, Rim.). (II) senvestigi: logika formo, ĉar, kiel vidite (N-ro 3, Rim. IV), vesto estis substantiva radiko jam en la Unua Libro. (III) Eksterteme ni registru la aperon de kredoble (Роятно) kaj po kun Akuz.*/

(c) La Ombro (represita kun korektigoj en Fabeloj de Andersen, Vol. 2, de 1926) (trad. Zamenhof, kiel Pecon 17):

alilanda RP (иностранный, cudzoziemski)	eltiri sin RP
aliri Eo	eniri RPG
alpremi G (an-, zudrücken)	enporti RPG
antaŭĉambro GP (Vorgemach, przedpokój)	enŝlosi Eo (kp.G einsperren)
bonintence GR (wohlmeinend, благонамеренный)	forveturi G (fortreisen)
bonhava G (wohlhabend)	kunpremi Eo
duonlumo Eo (kp.G Zwielficht, A twilight; P półmrok "duonmallumo")	kunpreni G (mitnehmen)
ekillumis Eo	kunveturi G (mitreisen)
elporti (laŭlit.) RPG	mirrakonto Eo
elricevi Eo	monfaristo Eo (kp.G Geldschläger)
elrigardi (aspekti) Eo (kp.G aus sehen "elvidi")	multekosta Eo
	multepova Eo
	nedetruibla GRP

*/ La meritplena libro "Unuaj libroj por Esperantistoj" alvenis el Japanujo ĝustatempe por ke mi povu kontroli miajn listojn pri subsekcioj (c) ĝis (f) ĉerpitajn el la 2a eldono, la sola, pri kiu disponas la Biblioteko de la Brita E.A. (kiu es trezoroj, kun la helpo de la Bibliotekisto, S-ro C.D.A.Capp, estis de granda utilo al mi ĉe la kompilado de ĉi tiu artikolo). Bonŝance, nur unu kunmetaĵon mi devis forigi: scivola, kiu estis plibonigo de la origina ricevis scion.

neeble GRP
 neesprimebla GRP
 nekredeble GPR
 neordinara RP
 piedosignoj G (Fussspuren)
 priskribo Eo
 postiranta (proksima) Eo (kp. P
 następny)
 sencere monie RP
 senhonte RP

sensociete Eo
 senvidiĝi Eo
 subiri (suno) G (untergehen)
 sukerpanoj G (Zuckerbrot)
 superverŝi Eo
 ŝajnevido (Fab. "imago") Eo
 trabati sin G (sich durchschlagen)
 trakuri GP
 transveturi RPG
 vojiro Eo

STATISTIKO: 43 vortoj, el kiuj 25 kun prep. (el 5; sen 4; en, kun, po 3; al, tra po 2; antaŭ, post, pri, sub, super, trans po 1). La serio ne- kreskas per 5; for- per 1; ali- per 1; bon- per 2 (sed nur adverbe); adj. kiel unua elemento per 2. Du-substantivaj vortoj ankoraŭ maloftas (5), sed al la adverbaj unuaj eroj aldoniĝas multe antaŭ adjektivo (2). Novaj estas vortoj el du verbaj radikoj: mirrakonto (Märchen) kaj ŝajnevido (ambaŭ ripetitaj en La Gefratoj, sube N-ro 9). **LINGVA FONTO:** kiel atendable ĉe traduko el G, ties elemento malpli postrestas la slavan ol ĝis nun (9 G kun 11 slav-G); tiom pli signifa la fakto, ke la originalaj sumas 18 (v. sube Rim. III).

REMARKIGOJ: (I) 6 vortoj mortnaskiĝis: elricevi (kvankam ankoraŭ en la aldono de la Fabeloj de 1926) - supozeble G redonis danan lokke per locken, kaj logi ne estis en la Unua Libro; postiranta (ŝanĝita al "sekvanta" en Fabeloj); sensociete (dana, do sendube ankaŭ G: Eremit, sed ermito ankoraŭ ne ekzistis); senvidiĝi (Fab. "preskaŭ blindiĝis", sed blinda ankoraŭ mankis. La dana signifas "dolorigis al li la okulojn"); vojiro (Fab. la eks-neologismo vojaĝo). (II) Aliaj plibonigoj en Fab. estas: priverŝis por superverŝis (v. N-ron 2 Rim.; kredeble G. redonis danan "vandet" (akvumita) per begiessen); samtempe por unutempe (kp. Aldono al la Dua Libro, OV p. 38); aspektas por elrigardas. (III) Bona ekzemplo de la krea talento de Zamenhof estas duonlumo: unuigo de P kaj G eble ŝuldata ion ankaŭ al F (demijour). (IV) sencere monie (parolas kun mi) redonas danan "siger du", do G dutzen, t.e. uzi "ci". (V) ekllumis fariĝis eklumis en Fab. (VI) Eksterteme ni registras la aperon de kompreneble (G verständlich), ne parolante jam pri (R не говоря; sed de kie jam?), malliberejo (Eo).

(d) Popoldiroj: Nulo.
(e) Kanto de Studentoj (trad. Hemza, t.e. Zam; v. Holzhaus, D-ro kaj Lingvo Esperanto, p. 320) (poste en FK^I, p. 328): senkompate RP (безжалостный, bezlitośny)

(f) El Heine (trad. "K.D.", t.e. Leo Belmont; v. FK 334): forkuri G

4. LETERO AL R.GEOGHEGAN (13 Feb. 1888) (OV 488): Nulo.

5. ALDONO AL LA DUA LIBRO (Junio 1888) (OV 29-40) (Zamenhof)

alfali G (zufallen)	lernlibro Eo (kp.G Lehrbuch
alveni G (ankommen)	"instru-libro")
bontrovo F (trouver bon; kp.G für gut haben)	neuzado Eo
depreni (de mi) (ne deponi!) Eo	radikvorto AG (rootword, Wurzelwort)
ellabori RPG (выработать, wypracować, ausarbeiten)	senbrue R (безшумный)
elparoli RPG (выговорить, wymawiać, aussprechen)	senfonda P (bezdenny)
elpuŝi RPG	senŝanĝa Eo
elskribi RPG (выписать, wypisać, ausschreiben)	senpense P (bezmyślny)
enhavi Eo (kp.G enthalten)	superlitera Eo
kuneteniloj Eo	transsendo (poŝta) RP (пересылка, przesyłka)
laŭvola Eo	trarigardo RP (перисмотр, przegląd)
leĝdonanta RPG (законодательный, prawodawczy, gesetzgebend)	vivipovanta Eo
	vortfarado G (Wortbildung)
	unuformeco G (einförmig, Uniformität)

STATISTIKO: 25 vortoj, el kiuj 17 kun prep. (inter kiuj unuafoje laŭ) (sen kaj el po 4; al 3; de, en, kun, laŭ, super, trans, tra po 1). Unuafoje ne- negativigas subst. Denove bon- kaj unu-. Du-subst. 3; subst/vb 1 (leĝdonanta); duafoje vb/vb (vivipovanta). LINGVA FONTO: Denove la originalaj ĉe kape kun 10; G krom siaj 4 dividas 5 kun la slavaj, kiuj havas nur 4 siajn proprajn, el kiuj P 3. F denove 1; al A tradukhazardo donis 1 (kun G tamen).

RIMARKIGOJ: (I) kuneteniloj: mortnaskita por "krampoj". (II) Eksterteme registriĝu aliĝi, plenumi, malgraŭ ke.

RESUMO PRI LA UNUA JARO

Sub nia lenso ni vidas la lingvon kreski per 173 kunmetitaj vortoj. El tiuj (54%) havas prepozicion kiel unuan elementon, plej ofte sen (24), kiun plej proksime sekvas el (15) kaj al (11). El la kunmetitaj sendependaj radikoj plej oftas la du-substantivaj kun 30, sekvataj de la du-adjektivaj kaj la subst/adj po 6, la adj/subst kaj la subst/vb po 3, la du-verbaj kun 4. Konforme al geografiaj kaj literaturaj faktoroj la lingva fonto estas slava kun kreskanta dozo de G; sed 69 kunmetaĵoj (ĉ. 40%) ne plene, aŭ tute ne, imitas nacilingvajn modelojn (ĉi tie nomitaj "originalaj" kaj indikitaj per "Eo"). Kiel trafe Zamenhof kunmetis, montriĝas el tio, ke nur 11 kunmetaĵoj mortnaskiĝis aŭ poste cedis al pli bonaj formoj.

LA DUA JARO

De nun, kvankam enkalkulante ilin, ni ne listigos tiujn prepoziciajn kaj nekunmetaĵojn, kiuj ne havas apartan intereson; kaj ni lasos al la legantoj la distingon inter la radikoj.

6. LETERO AL L.EINSTEIN (iam en 1888) (OV 416). Nulo.

7. LETERO AL A.DOMBROVSKI (9 Dec. 1888) (OV 489):

elsendi RPG (ankaŭ Let. 62 kaj 63, sed jam ne uzata tiusence)
enskribi PRGF (kaj ital.) (t.e. kiel abonanton)

8. LA NEĜA BLOVADO (de Puŝkin, trad. Grabowski antaŭ Okt. 1888, dato de cenzuro, sed publikigita 1889). (Rim. Fi inter krampoj indikas la tradukon de Fiŝer de 1923):

Antaŭparolo: transdoni R (передать) (kp.P oddać, G übergeben)

Teksto:

(a) Prepoziciaj:

antaŭdecidi Eo (Fi: esperis edziĝi; senkonsileco P (bezradność)
R destinis) senkulpiĝi Eo

denove RF (СНОВА, de nouveau) subteraĵo R (подземелье)
elpensi R (выдумать)

(b) Pronomo, adverbo, numeralo, "ne" kiel unua elemento:

ĉiuminute Eo (поминутно) forpermese Eo
deksep (-ses, kvardek)-jara RG nesenkauze Eo
duflanka Eo (Fi: reciproka, kp.G tiasence Eo (Fi: tiamaniere)
beiderseitig) unuanimeco R (единодушие; kp.G
duon (kvaron)-horo RF Einmütigkeit)

(c) Sendependaj radikoj:

ĉefurbo G (Hauptstadt) meznokto GA (Mittenacht, mid-
night; Fi: noktomezo)
flankfruntoj Eo (Fi: tempioj) noktĉapo GA (Nachtmütze, night-
cap; Fi: noktoĉapo)
gastĉambro R (Fi: salono) noktosurtuto Eo (Fi: varma
ondforma Eo (R onda; Fi: jakko)
glitveturilo Eo (kp.G Schlittfahren) pikradetoj Eo (Fi: spronoj)
kapdoloro G (Hauptschmerz; RP rondurboj Eo (Fi: provincaj
kortuŝante Eo (Fi: kortuŝa) distriktoj; R distrikturboj)
lipharoj Eo ŝajnkauzo Eo (Fi: preteksti)
lumiksi Eo (Fi: miksi) temaŝino Eo (Fi: samovaro)

STATISTIKO: 69 vortoj, el kiuj 31 kun prep. (ekz. el 8; sen 6; ĉirkaŭ 4).

Ne- 11. La unuaj tia- kaj -jara. LINGVA FONTO: (de la cititaj vortoj):
R 5; P 1; G(A) 4; RG 1; RF 2; Eo 17.

RIMARKIGOJ: (I) La reĵeto de R поминутно favore al ĉiuminute interesos
tiujn, kiuj serĉas taŭgan prefikson en frazeroj pri rapideco kc. (II) forper-
meso: kp. R отпуск ("depermese") kaj G Urlaub, subst. parenca al vb.
erlauben "permesi". (III) Interese, ke gastĉambro, origine laŭlitera tra-
duko de R гостыня (salono) dum ĝanĝis signifon, kvazaŭ gasto devus sig-
nifi "tranokta vizitanto" (A spare-room). (IV) alsidanto (fariĝonta "ase-
soro" en la 2a eldono kaj poste en Fi. ŝajnas unuigi latinan adessor kaj
ties rusa devenaĵo заседатель. (V) kuneligaĵo estas ne tre sukcesa provo
redoni R узел "fasko", "nodo". Nepre necesis la neologismo paki! (VI) Ek-
sterteme notindaj estas: apenaŭ ne (ankaŭ Fi!) por preskaŭ (R чуть не);

malvera por neĝusta (A wrong) (antaŭ direkto); ĉirkaŭpenditaj de krucoj por ornamitaj per ordenkrucoj (Fi.); disligo de R развяэка (kp. F dénoûment) (Fi: findisvolvo); sed diskuŝigi (kartojn) estas originala, ĉar R раскладывать egalas dismeti de Fi.

9. LA GEFRATOJ (de Goethe, trad. Grabowski antaŭ Jan. 1889) (cenzura dato), sed publikigita antaŭ Marto. (Ni citas la G-vortojn de la teksto).

- | | |
|--|------------------------------|
| (a) jeteno (de l' vivo) Eo (Unterhalt) | senfundaĵo Eo (Abgrund) |
| postmanĝo Eo (Nachtisch) | senkredeco Eo (Unglaube) |
| (b) iatempe Eo (manchmal) | trouzi Eo (missbrauchen) |
| plejprofundaĵo G (im Tiefsten) | unupensa kun Eo (eins mit) |
| plivastigi Eo (ausweiten) | |
| (c) adiaŭdiri Eo (scheiden) | domamo Eo (Häuslichkeit) |
| amplena G (liebевoll) | fulmotondra Eo (Wetterwolke) |
| ĉevaliri Eo (reiten) | |

STATISTIKO: 49 vortoj, el kiuj 28 prep. (sen 6). Nur unu ne-: ne-elportebla (unerträglich), sed elteni (aushalten). La unua ia-; la dua je-. LINGVA FONTO: G 2, Eo 12. (La plejmulto el la ne-cititaj prepoziciaj vortoj estas ankaŭ G).

RIMARKIGOJ: Interesa estas trapensi (überlegen, konsideri); netaŭga malverdiri (lästern) bezonanta neologismon blasfemi; dube taŭga uzo de -eten antaŭscieti (ahnen, antaŭsenti, ĵus uzita por la preskaŭ sinonima vermuten!).

10. LETEROJ AL MAJNOV (OV 475-486) (Feb. Dec. 1889):

- | | |
|----------------------------|-------------------------|
| (a) eksterlando (Let.67) G | senpacienco Eo |
| senmone " PR | subteni (73) PRGF |
| senkondiĉuloj " Eo | |
| (b) singardema (61) Eo | (c) librotenejo (87) Eo |

STATISTIKO: La novaj vortoj (16) estas plejparte prepoziciaj. Ankoraŭ du ĉiu-kaj la unua sin-. LINGVA FONTO: plejparte slava.

RIMARKIGO: senpacienco, kontraŭ RPG ne-, estas logika formo, ĉar pacienco ekestis kiel subst.radiko.

11. VORTARO POR HISPANOJ (de Wahl) (Jan.1889). Nulo.

Dume eliris

12. PLENA VORTARO RUSA-INTERNACIA (Zamenhof; antaŭ 28 Dec.1888 -cenzura dato- kaj pub. verŝajne post Jan.1889):

(a) alcentrokura Eo (R "centropeta")	kunkulpulo Eo
alelekti Eo	kunnaskita (patruja, kara) Eo
allasi R (допускать)	kunsido Eo (кр.Р. заседание)
antaŭhieraŭ Eo	laŭlarĝe (transverse) Eo
antaŭlego (prelego) G (Vorlesung)	laŭlonge Eo
antaŭnelonge Eo	perlabori Eo
apudmara R (приморский)	postdrinka Eo
ĉirkaŭmano (braceleto) Eo	postmorgaŭ R
decentrokura Eo (R "centr-evita")	poststara (neprogresema) Eo
defluilo Eo	(кр.Р отсталый)
dekonsili (malkonsili) R	posturbaĵo R
(отговаривать)	po(mal) granda Eo
elpaŝi R (выступать)	prilabori Eo (кр.Р зарабатывать)
elspezo Eo	propetanto Eo
enspezo Eo	senĝena Eo
entute RP (ВОВСЕ, wcale)	senlaborulo R)
ĝis sate (tiel!) R (досыта)	sentaŭgulo Eo) (безделник)
intermonto Eo	subaĉeti Eo
interspaco Eo	subakvisto Eo
intertempo Eo	suboficero G (R напораль)
kontraŭvole Eo	subtegmento Eo
kromvirino Eo	superjaro Eo

STATISTIKO (pri la 42 cititaj prep. vortoj): Unuafoje aperas apud, ĝis (apartigita tamen!), kontraŭ, krom, per, kaj pro. LINGVA FONTO: El la por citado elektitaj vortoj 31 estas originalaj, 8 R; 1 RP; kaj 2 G.

RIMARKIGO: Ŝajne mortnaskitaj estis pririgardi (opinii) kaj elescepti (ekskluzivi).

(b) aliformigi Eo, -religiulo Eo; centjaro R (столетие, кр.G Jahrhundert); duonblanka Eo, -ĉemizo Eo, -insulo R, -patro kc. Eo; dupunkto R (двое - чие), -senca R; forkomandi Eo (командировать, de G); kvarpieda R; kva-zaŭ-besto Eo, -homo Eo; malplimulto R (меньшинство); memfido R, -lernin- to R, -mortigo R, -potenca (aŭtokrata) R (самовластный), -volulo Eo; mult-angul R, -enprena (vasta) Eo, -foja R; -jara Eo; -kolora Eo, -parolita (glo-

ra) Eo; neatendite Eo, -plenjara Eo; samaĝulo Eo, -gentulo Eo, -landa Eo, -lima (najbara) R, -mezura Eo, -noma Eo, -patrujano Eo, -religiulo Eo; sesĉevalo Eo; trinaskitoj Eo, -speca Eo; unuenaskito G; unuflanka R, -nombro R, -peca (senintermanka) Eo, -potenco R, -speca R, -voĉa R.

STATISTIKO (pri la vortoj kun adverba aŭ pronoma prefikso): Unuafoje aperas kvazaŭ-, mem-, sam-. LINGVA FONTO: El la 45 vortoj: Eo 26; R 18; G 1.

(c) (I) Subst/subst.:

abelviro Eo
 aerveturanto Eo (R "-naviganto")
 akvokonduko RG
 akvomalsano G
 akvoturnejo Eo
 baptofilo kc. Eo
 bartrabo Eo
 biendomo Eo
 bienhavanto Eo
 brustosto Eo (R "brusta osto")
 brusttuko ("surbrustaĵo") G
 buŝpeco G (kaj A "mouthpiece")
 butontruo G
 ciferplato R
 ĉashundo G
 ĉaskorno G
 ĉieliro G (Himmelfahrt)
 ĉefepiskopo Eo
 dentviando ("gingivo") Eo
 Dipatrino R
 diservo R
 domhavanto ("urbano") Eo
 enterigiro Eo
 fervojo G (R "fera vojo")
 fiŝhoko G
 fiŝkaptisto R
 florkrono Eo
 fojosako G
 gardstaranto Eo
 grenkampo Eo
 hejmsidulo R
 herbomanĝanto R
 homevitulo Eo
 jartempo G
 ĵurrompanto Eo
 kamentubisto Eo
 kamlaborado G

kapkuseno G
 kapturino R
 kolharoj Eo
 kolorperdemo Eo
 koltuko G
 korktirilo G
 korthundo Eo
 krucmilitisto Eo
 kudroringo ("fingringo") Eo
 laktinfano Eo (kp. R молокосось)
 leĝscienco R
 limtempo Eo
 litkurteno G
 lumturo Eo
 mampinto Eo (kp.G Brustwarze)
 manĝrestaĵo Eo
 manlaboro R
 marveturo G
 manplato Eo (kp.G die flache Hand)
 manradiko Eo
 militkaptito RG
 montlabora (mina) Eo (kp.Rгорный)
 muelŝtono G
 muskaptilo G
 naturesploranto R
 naturscienco G
 neĝvento Eo
 noktomezo Eo
 notlibro Eo
 okulharoj Eo
 okulvidanto R
 okulvitroj Eo
 orŝtofo Eo (brokaĵo)
 ovblanko G
 parnombro Eo

piedfingroj Eo (kp.F)
 piedfrapado Eo
 piediranto R
 piedvesto Eo (kp.A footwear)
 popolamaso Eo
 popolkonsultiĝo Eo (P Sejm)
 preseraro G
 puŝveturilo G
 radilumo Eo
 radsigno Eo
 randstrio Eo
 remŝipo G
 rukurteno G
 sangadulto Eo
 sangellaso R
 sangsuĉanto Eo
 sangverŝo RG
 sanktakvujo Eo
 sciaĵportisto Eo
 servosoldato Eo
 sigelvakso G
 somerloĝo Eo (дача)
 sonserpento Eo
 sunfloro G
 stacidomo Eo
 ŝaffelo Eo
 ŝippereo Eo
 taglaboristo Eo
 taglibro G

tagnoktegaleco Eo
 tekruĉo G
 telertuketo G
 tempkalkulo R
 terlaborado R
 terpomo GF
 tibiviando Eo
 trinkejmajstro Eo
 turnovento Eo
 vakstolo G
 vangosto G
 ventroparolisto G
 vertharo Eo
 veterflago Eo
 viandomanĝanto R
 vinbero Eo
 viradulto R
 vojsigno Eo
 Plue: brand) R
 nenion) farado Eo
 sap) faranto Eo
 bier) faristo Eo
 suker) Eo
 vers) R
 -forma sak- Eo; ovo- R
 -tenado libro- G; ŝaf- Eo
 -arbo GA
 -edukado (ekz. brut-) Eo
 -konstruado (ekz. tur-) R

(c) (II) subst/verb.:

fajropafo Eo
 fruktoporta R
 homtima Eo
 kaprompa R

kornoporta Eo
 partopreno Eo
 signaldiro Eo (R пароль , "pasvorto")

(c) (III) verb/subst.:

blovinstrumento G
 brulgusta Eo
 brulodoro Eo
 brulvundo Eo
 celtabulo Eo
 erarlumoj G
 falakvo Eo (poste akvofalo RG)
 ĝojkrio Eo
 kaŝtruo G
 kuraclibro Eo
 lavvazo G

ligotubero Eo ("nodo"; kp.G Knolle)
 lulaboristo Eo (kp.G Tagelöhner)
 pafarko Eo
 pendglacio Eo
 pendlito Eo
 punlaboro G
 plektbarilo Eo
 preĝlibro G
 suĉbesto Eo
 tirŝnuro G
 venksigno Eo (R трофей)

(c) (IV) adj/subst.:

akrasenta Eo
akraviga Eo
arĝentkolora Eo
belkreska (gracia) Eo
belparolulo Eo
belskribado R
bonanima R
-kondukta Eo
-kora Eo
-religia (fidela) Eo
-rikolta Eo
-stato R
-teniĝo (gracio) Eo
egalnoma Eo
egalpezo R
flavmalsano Eo
flirta-anima Eo
malgrandnombra R

grandpeca Eo
-ranga (eminenta) Eo
-sinjoro Eo
ĝustatempe Eo
(ne) ĝustloka Eo
lambastono Eo
libertempo Eo
longedaŭra Eo
malgrandanima R
malkovranima Eo
malproksimvida R
malvarmasanga R
molanaso Eo
nigrharulo Eo (R брүнет)
plenmano Eo
sanktfiguro (ikono) G
simplanima R

(c) (V) subst/adj.:

okulvidebla R
sangavida R

sukplena Eo
violkolora Eo

(c) (VI) adj/verb.:

bonfari RG
bonodori R
ebenbati Eo

egalopinii Eo
plen- Eo (R HA-)

(c) (VII) adj/adj.:

egalforta R
flavruĝa Eo

frumatura Eo
nigrablua Eo

(c) (VIII) verb/verb.:

brulruĝigi (-igi) Eo
dontrinki (trinki) Eo
oferverŝi Eo
penatingi Eo

spirblovi Eo
tremfrosti Eo
trudpetanto Eo
vetbatali Eo

(c) (IX) adv/subst.:

nuntempa Eo

STATISTIKO (pri la sendependaj radikoj): El la 218 pro graveco elektitaj kunmetaĵoj la grupo subst/subst estas notinde la plej granda (133, t.e. 61%).

Eble havas signifon, ke la tuta grupo verb/verb estas "Eo"; certe tio konformas al alia konstato, ke Eo ofte havas kunmetaĵojn, kie R aŭ G uzas adjektivon kun

substantivo. (Pretere, la alskribado de vorto al ĝia grupo estas ofte diskutinda). LINGVA FONTO: G 41; R 36. (Plue G dividas 4 kun R, 2 kun A, 1 kun F). Eo 133.

RIMARKIGOJ: (I) Rimarkinda ja estas la plimulteco de G kontraŭ R en vortaro, kies bazaj vortoj estas R; rimarkinda ankaŭ, sed konforma al la jam notinda tendenco estas la esperanta originaleco de la plejmulto (61%). (II) Mortnaskitaj ŝajne nur sciaŝportisto (kuriero) kaj morinstruo (R) (moralinstruo). (III) -viando poste fariĝis -karno (kp. Hamleto, 8a eld. (1964), p.VI). (IV) Eksterteme, ĉi tie ekaperas amindumi (Eo), aerumi (Eo), nudpied (G) (kp. Hamleto, 2, II, 551), posteulo (Eo), vole-nevole (R).

RESUMA STATISTIKO PRI N-RO 12 (Plena vortaro rusa-internacia): LINGVA FONTO: El la 305 cititaj vortoj 190 (66%) estas originalaj; 63 R; 44 G. Plue R dividas 3 kun G, 1 kun P; G dividas 2 kun A kaj 1 kun F. Mortnaskitaj 4.

13. MEZA VORTARO INTERNACIA-GERMANA (Zamenhof, antaŭ Jan. 1889 (cenzura dato); pub. post Aprilo). (La Plena Vortaro rusa-int. jam liveris multajn el la en ĉi tiu entenataj vortoj).

(a) antaŭurbo G (Vorstadt)	deveni Eo
ĉirkaŭpreni R (kp.G umarmen)	elsidi R (высидеть)
delogi Eo (verführen)	submajstro Eo (Handwerksgesell)
depago Eo (Steuer, Abgabe)	subŝtofo Eo (kp.G Unterfutter)
dependi AF	superakvi R (наводить)
(b) Nulo.	
(c) akvomelono GA	plenaĝa Eo (kp.R совершеннолетний)
ĉielarko F (kp.G Regenbogen)	pordhoko Eo (R дверная петля)
harligo Eo	punktokomo Eo
Kristnasko Eo (kp.R Рождество	sekvinbero Eo
Христово)	terkolo Eo (kp.R перешеек
mezonombre Eo (kp.R средним	kaj G Landenge)
числом)	

STATISTIKO: El la 20 novaj kunmetaĵoj cititaj post la forigo de kelkaj negravaj prepozicioj 10 estas prepoziciaj. LINGVA FONTO: R 4; G 2; F 1 (kaj kun A 1); Eo 13.

RIMARKIGOJ: (I) Nun (kompense!) germana vortaro cedas la plimultecon al R. (II) La sendependeco de Eo klare vidiĝas ĉe terkolo, lerta unuiĝo de bazaj ideoj de G (Land-) kaj de R (-kolo), kaj ĉe ĉielarko (anst. pluvarko).

(III) Mortnaskita (pro posta kovi): elsidi (ovon) (kp.A "to sit out" en al-
iaj kuntekstoj). (IV) Eksterteme: La sinsekvo flori/floro jam plenumiĝis
(v. supre n-ron 3, Rim. IV); unuafoje vidiĝas derivaĵoj de per: pera,
peri.

14. LETERO AL DOMBROVSKI (OV 489) (17 Majo 1889): Nulo.

LA TRIA JARO

15. "LA ESPERANTISTO", N-ro 1 (Sept. 1889) (Zam.)

(I) "Prospekto": interligi G

(II) "Esperanto kaj Volapük" (Sep-Nov 1889) (OV 258-268) (G ĉe Holz-
haus p.48):

(a) antaŭstari G (ging voraus) senlaca Eo (G signifas entuziasma!)
elprovita RG (erproben)

(b) plimulto Eo (grösseren Teil)

(c) gloramo R vivkapableco G (Lebensfähigkeit)

(III) "Al la Esperantistoj" (poemo) (OV 591; Holzhaus 432):

senhalte Eo trarompi G

(IV) "Respondoj al la Amikoj" (Sep-Dec.1889) (OV 58, 61-62)

pligrandigadi RPG

(V) "Novaĵoj" (1 Sep kaj 1 Nov 1889) (Holzhaus 59-60): Nulo.

(VI) "Tutmonda Ligo de Esperantistoj" (Nov 1889) (OV 59-60: G ĉe Holzhaus 55):

plejmulto Eo (Majorität)

(VII) "Letero al la Amikoj" ("el Rusujo") (Dec 1889) (OV 60):

senvola P (bezwolny)

(VIII) "Antaŭparolo al la L.I. de la Nürnberga Klubo"

nemorteblo Eo vortlingvo G

STATISTIKO: 14 novaj kunmetaĵoj, duone prepoziciaj. LINGVA FONTO: G 5;
slavaj 2, kun 2 el ambaŭ; Eo 5.

RIMARKIGOJ: (I) Komparado kun la germana versio montras denove la "ori-

ginalan" karakteron je la Esperanta vortfarado. (II) Eksterteme registriĝu el "Prospekto": disvastigi.

16. ANTAŬPAROLO AL LA VORTARO DE LA LINGVO ESPERANTO (okt.1889) (OV 595): eksterordinare GF (kp. ne-, supre 3 c).

17. NOMARO DE L'VERKOJ PRI...ESPERANTO, kiuj eliris ĝis Okt 1889 (OV 597): Nulo; kiel ankaŭ ĉe la Nomaro aperinta kiel parto de la Aldono al la Dua Libro (N-ro 5) (v. Unuaj Libroj por Esperantistoj, p. 104)

18. "LA ESPERANTISTO", N-ro 2 (Nov.1889)

(I) "Sonoriloj de Vespero" (de Grabowski): Nulo.

(II) "Korespondado": deskribi Eo

(III) "Respondo al la Amikoj" (Zamenhof): lingvotrezoro G (Sprachschatz)

19. "LA ESPERANTISTO", N-ro 3 (Dec.1889)

(I) "Demando ankoraŭ ne priparolita" (de Wahl)
enpreso (impreso) G subiri (obei) Eo

(II) "La Virineto de l'Maro" (trad. el H.C.Andersen, de Anna R., t.e. Zamenhof, laŭ Maimon en Monda Kulturo, vintro 1965, p.12 kaj Holzhaus 328):
grandaĝa (plenkreska) Eo rozaruĝa Eo
naskotago GA

(III) "La pluva tago" (trad. el Longfellow de Grabowski)
sensuna Eo

STATISTIKO pri "La Esp." N-roj 2 kaj 3: 8 novaj vortoj. LINGVA FONTO:
aŭ G (3, unu kun A) aŭ Eo (5). RIMARKIGO: Mortnaskitaj: la 2 el N-ro 19
(1).

20. PRINCINO MARY (de Lermontov, trad. de Wahl, Kajero 1) (Okt.1889; cenzura dato Aug.1889). Holzhaus 60, -kie elfalis "estos" antaŭ "eldonita"- kon-

firmas, ke la verko estis jam tradukita antaŭ 1 Nov. 1889. Laŭ Ziolkowska, Doktor Zamenhof (sed nur en la pola parto, p. 155!) ĝi publikiĝis "en tiu sama jaro"; kaj en la Libro-listo de Geoghegan ĝi tuj antaŭas la I-an Adresaron de Sep. 1889. La dua Kajero eliris nur en 1896 kune kun la 2a eldono de la unua; pro kio la Enciklopedio, s.v. Wahl, datas la verkon en tiu jaro).^{*/}

- | | |
|-------------------------------------|--|
| (a) alligo Eo | entranĉita Eo (вырезано , "el-") |
| altranĉo Eo (покрой) | kontraŭdiro R (протыворечие) |
| deiri R | senflama Eo (вялы , "velka") |
| delasi R | transaĉeti R (перекупить) |
| deveturi R | transrakonti (raporti) R |
| ennaskita R (врожденный) | (пересказывать) |
| enpeti sin R (напрашиваться) | |
| (b) memkontento R (самодовольство) | nereveneble R (невозвратимо) |
| multlingva R (многоязычный) | : netieĉia R (не здешний) |
| sed ĉi tie (равно -) | |
| (c) apogseĝo G (Lehnstuhl) | plenblovi sin Eo (надулѣя ; кр. satridegi sube) |
| ebenlanda Eo (степной) | princedzino Eo |
| elvido G (Aussicht) | propromo Eo (R "memamo") |
| lumeflava R (светло-желтый) | saĝperdo Eo (безумие) |
| malbongusta Eo (trad. F dégoûtant) | satkoketiĝi Eo |
| mallumvizaĝa Eo (смуглы) | satridegi Eo (нахохотать ; v. N-ron 12 (с) VI) |
| montkapo Eo (вершина) | ŝprucbarbo Eo (брыжка) |
| naskmakulo Eo (родинка) | trankvilanima Eo (равнодушный) |
| novealveturinta R (новоприезник) | |

STATISTIKO: 33 novaj kunmetaĵoj (senkonsidere al iuj negravaj, precipe prep.), el kiuj nur 12 prep. LINGVA FONTO: R 14; G 2; Eo 17.

RIMARKIGOJ: (I) Interesa, kaj eble inda je imitado fare de tiuj, kiuj trovas malsupren tro longa prefikso, estas la uzo de de- en ties senco (sed de- turni regule ĉi tie kaj deiri alisence ĉe Zam., OV 270/-8). (II) Al de Wahl

^{*/} Ĉi tiuj kunigitaj kalendaroj liveras problemojn: kvankam la paĝnumerado progresas seninterrompe, mankas almenaŭ 10 paĝoj de la teksto inter paĝoj 32 kaj 33, kio tamen ne tuj sentiĝas dum legado, ĉar p. 32 hazarde finiĝas per punkto. Plue, kvankam la unua kalendaro finiĝas per p. 32, la aŭtoro atentigas sur la kovrilo de la dua kalendaro, ke la unua iris ĝis paĝo 25 (ĉu inkluzive aŭ ne, ne gravas, ĉar ĉiuokaze tio estis tre nekonvena loko por lasi la legantojn pendi dum 7 jaroj).

do ŝuldiĝas prefiksa sat-. (III) Mortnaskitaj estis elvido (aspekto), ebenda (ebenafa), elserĉita (malkomuna, rafinita), altranĉo (fasono; kptajli), malbongusta (naŭza), alesto (ĉeesto), ennaskita (de-, kun-, naskita), entranĉi (ĉizi), transrakonti (raporti), transaĉeti (superproponi). (IV) Eksterteme registriĝu: al mi ne feliĉis (prosperis).

21. "LA ESPERANTISTO", N-ro 4 (Jan.1890)

(I) "Esperanto kaj Volapük" (daŭrigo):

fortuzo (fortostreĉo) Eo (kp.R усилие) senkompare Eo (R "senegale")
sendankeco Eo (R HE-) sennatureco Eo

(Holzhaus ne daŭrigas citadon de la germana post n-ro 2, p.12)

(II) "Respondoj al la amikoj": patrolando G

(III) Letero de Majnov: egalrajte R (равноправный)

STATISTIKO: 6 novaj vortoj, duone prepoziciaj (sen-). LINGVA FONTO: R 1; G 1; Eo 4.

22. UNUA ADRESARO (Jan.1890; cenzura dato Sep.1889) (Holzhaus 265): Nulo.

23. POŝTKARTO AL DOMBROVSKI (Jan.1890) (OV 489): Nulo.

24. "LA ESPERANTISTO", N-ro 5 (Feb.1890)

(I) "Esperantistoj vastigantoj" de Olga L.

alvarbi G (anwerben)

elebenigi (mankon) Eo (kp.R
kaj G: уравнивать , ausglei-
chen)

(II) Letero-artikolo (de Wahl): Nulo.

25. "LA ESPERANTISTO", N-ro 6 (Marto 1890)

(I) "Pri nia Ligo" (OV 63)

alformigi (adapti) Eo (NE aliformigi,
kiel ĉe Dietterle)

egalforta R (равносильный)
facilanima RP (lekkomyślny)

(II) "Regularo de la Ligo Internacia de Esperantistoj" (OV 65-69; G ĉe Holzhaus 56-58):

(a) alskribiĝi Eo sendispute RP (бесспорный ,
enporto Eo (G Beitrag) bezsprzeczny)
kunmetado Eo (G Anfertigung) sennacia Eo
(alia senco ol ĉe 3 c)

(b) memstare G (selbstständig; кр.Р самоистно́ść)

(c) novenkondukaĵo R (нововведение)

26. "LA ESPERANTISTO", N-ro 7 (Apr.1890)

(I) "Al la Fratoj" (poemo) (OV 588; Holzhaus 433): alradikiĝi Eo

(II) "Kanto de l' Ligo" (germana poemo trad. de Zam.) (Holzhaus 443):
senzorge RP (беззаботный , beztroski)

(III) "La Virineto de l' Maro" (daŭrigo);

multepeza Eo orkovrita Eo
helflava G palruĝa G (blassrot, A "pink")

27. "LA ESPERANTISTO", N-ro 8 (Majo 1890)

"Pri la ŝanĝado de la Lingvo Internacia" (A.F.Rundstedt)

lingvolerta G (sprachenfertig) supersignitaj (literoj) Eo

STATISTIKO pri "La Esperantisto" N-roj 5-8: 20 novaj kunmetaĵoj, el kiuj 11 prepoziciaj. LINGVA FONTO: R 2; RP 3; G 5; Eo 10.

RIMARKIGO: Eksterteme, malnatureco: v. supre n-ron 21 I).

* * *

RESUMA RERIGARDO: Do en la unuaj tri jaroj la Esperanta vort-trezoro pli-grandiĝis per 715 senafiksaj kunmetaĵoj (el kiuj 250, t.e. 35%, komenciĝis per prepozicio). La lingvo kvazaŭe kreskas antaŭ niaj okuloj: kiel la disvastigado profundigis la radikojn, tiel la verkado sendis sian limfon tra la tutan organison, kreante novajn petalojn, ĝis pli matura, pli forta, floro staras antaŭ ni. Kaj la krea mano estis plejparte tiu de Zamenhof mem, kiu tiel bone scipovis unuigi la erojn de li kreitajn, ke nur 18 el 555 petaloj (3%) velkis sur la tigo.

Kontrastu de Wahl: el la 35 kontribuitaj de N-ro 19 (I) kaj N-ro 20 (Princino Mary) 12 (34%) ne havis morgaŭon. (Por Grabowski la ciferoj estas: el 118 (N-roj 8 kaj 9) nur 3 (2.5%). Plue, kvankam la lingvaj fontoj precize spegulas la lingvanecon de la verkintoj (tiel montrante la kompletecon de la Esperanta esprimilaro), tamen oni ofte preferis krei vorton rekte el la rimedoj de Esperanto, sukcesante foje tiamaniere pli trafe redoni la koncernan imagbildon. Tiel, apud la 133 slavmodelaj vortoj (18%), la 106 modeligitaj laŭ G (inkl. 7 GA) (13%), kaj la 39, kiuj redonas ambaŭ grupojn (5%), ni trovas 246 (34%) originale formitajn. Do la plej granda grupo konsistas el kunmetaĵoj, por kiuj Eo ne estas sklava kopio, sed memsufiĉa imagbildanto. Dume, rilate al F (nun liveranta nur 3, plus 4 kune kun R (2) aŭ A) kaj al A (nur tiuj 7 kune kun G), ties verkistoj devis ankoraŭ veni.

Estu instigita iu alia mezuri la kontribuaĵojn de tiuj!